# RATKAPTISTA KURIERO

## INFORMILO DE LA RATKAPTISTA BANDO

NUMERO 36 Kontakt:H.W.Sprick; hameln@esperanto.de;www.esperanto.de/hameln; Tel:0162/7536396 JANUARO 2006

## Termine 2006

(1. Halbjahr)

montags **19.00 Uhr**, Sumpfblume, HM

Kurs wöchentlich ab 18.00 Uhr (bis Ende April)

**ab Februar immer dienstags**

**Mo.: 9.Jan., 23.Jan., Di.: 7.Feb., 21.Feb.** *(Jahreshauptversammlung)*, **7. Mrz., 21.Mrz., 4.Apr., 18.Apr., 2.Mai, 16.Mai, 6.Jun., 20.Jun., 24.-28.Juni** *(BARO in Bad Münder)*, **4.Jul., 18.Jul.,** *(somera paŭzo), Das Programm:* ***www.esperanto.de/hameln***

**Einladung zur Jahreshauptversammlung:**

am: **21.Feb. 2005** um: **19 Uhr**

in der **Sumpfblume** in Hameln

TOP's: Begrüßung, Jahresbericht 2005, Kassenbericht, Planungen 2006, Verschiedenes

## Esperanto-Treffen: www.eventoj.hu/kalendar.htm

**2006:** 17.-19.2. 28. Studienwoche in **Herzberg/Harz**; 24.2.-2.3. Sprachkurse in **Herzberg**; 1.-10.4. Sprachkurse in **Herzberg**; 10.-17.4. **22. PSI** Intern. Frühlingswoche + 29. Studienwoche in **St. Andreasberg**; 12.-18.4. **30. IJF** Intern. Jugendfestival in Italien; 28.4.-1.5. 87. Britischer Esp.-Kongress in Scarborough, GB; 29.4.-9.5. 18. Aroma Jalto auf der Krim, Ukraine; 5.-7.5. Bibelwochenende in Zell a. Harmersbach; 2.-5.6. **83. GEK** Deutscher Esp.-Kongress (100 Jahre DEB) in **Braunschweig**; 16.-18.6. 30. Studienwochenende in **Herzberg**; 22.-28.6. Sprachkurse in **Herzberg**; 24.-28.6. **BARO** Waldtreffen in **Bad Münder**; 1.-8.7. EKOTUR Ökotourismus-Seminar in Tschechien; 1.-14.7. erholsame Tage in den Beskiden, PL; 4.-8.7. **42. BET** Baltische Esp.-Tage in Estland; 16.-23.7. **2.KAFE** Kultur- und Kunstfestival in Toulouse, FR; 29.7.-5.8. **91. UK** Esp.-Weltkongress in Florenz, IT; 6.-13.8. **62. IJK** Jugendweltkongress in Sarajevo, Bosnien-Hercegovina; 12.-19.8. 56. KELI-Kongress des christl. Esp.-Verb. in Tschechien; 12.-19.8. **29. SEFT** Familien-Zeltlager in Thomsdorf; 13.-20.8. **19. IJS** Intern. Jugendwoche in Makó, Ungarn; 19.-26.8. **79. SAT**-Kongress in Belgrad, Serb.-Montenegro; 20.-28.8. **15. MELA** Baden in Ungarn; 7.-10.9. **BARO** Waldtreffen in **Bad Münder**; 29.9.-3.10. SUS 29, Universitätssitzung der Intern. Akademie der Wissensch. von San Marino in Komárno, Slovakei; 29.9.-3.10. **5. KOKOLORES** Spieletreffen in Herne; 30.9.-3.10. Pädagogische Tage in **Herzberg**; 2.-8.10. InPaSem Sprechübungswoche in Tschechien; 4.-7.10. Sprachkurse in Herzberg; 1.-3.12. Sprachkurse in **Herzberg**; 8.-10.12. 31. Studienwochenende in **Herzberg**; 27.12.-3.1. **50.IS** Intern. Woche für Jugendl.; 27.12.-3.1. **23.IF** Intern. Festival; 28.12.-8.1. **5.NR** Neujahrstreffen; 25.-28.5.207 **84. GEK** in Hamburg; 4.-11.8.2006 **92. UK** in Yokohama, Japan;

## Mallonga raporto pri aktivecoj en 2005:


Lore dum lingvokurso en Herzberg


Wolfgang kaj Ingrid gvidas botanikan ekskurson dum la BARO en Bad Münder

En 2005 ni renkontiĝis 25-foje (plus 5-foje nur kun la kursanoj), 22-foje en la „Sumpfblume", po 1-foje en la „Pfannekuchen", dum la kulturtago kaj dum la 2-a Rata Rendevuo. Bedaŭrinde venis neniu eksterlanda gasto; Michael el Britio lastmomente devis informi nin pri lia neĉeesto pro malfruiĝo de trajno. Komence de la jaro Heinz helpis kelkajn lernantojn de la 13-a klaso de la „Vikilu"-gimnazio ĉe prelego pri planlingvoj. Ni produktis kaj akceptis statuton por nia grupo. Ni disdonis varbkartojn enkadre de la agado „Esperanto jetzt" kaj donacis lernolibrojn kaj kompaktdiskojn al 21 lernejaj kaj komunumaj bibliotekoj. Wolfgang kaj Ingrid denove kunorganizis 2-foje la BARO-renkontiĝon en Bad Münder. Heinz gajnis kiel la unuan premion unujaran abonon de la gazeto „Monato" ĉe konkurso de „edukado.net". Tre sukcesa estis la partopreno dum la „3. Hamelner Kulturtag", kiun ni partoprenis per informstando kaj Esperanto-kvizo. Ni povis organizi 2 informvesperojn kaj starti kurson por komencantoj uzante la lernolibron de Audrey Childs-Mee „Saluton – Esperanto aŭtodidakte". (Semajnfina kurso ĉe la „VHS" pro manko de partoprenantoj ne okazis). Al la 2-a Rata Rendevuo en novembro venis 21 homoj; gastoj venis el Laatzen, Schwarmstedt, Bielefeld, Detmold, Hildesheim, Herzberg/Harz kaj la regiono Unterweser. Ni rigardis la Münster-preĝejon kun la ekspozicio „vizaĝoj" kaj Hameln de supre post grimpado sur la turon. Post manĝado en itala restoracio ni vizitis la „Erlebniswelt Renaissance" (aventura mondo Renesanco) kaj fine ni ĝuis prelegon de Reinhard pri la UK en Vilno kaj vojaĝo tra Litovio. Kelkaj de ni ankaŭ mem estis gastoj ĉe diversaj renkontiĝoj kaj poste raportis pri ili: dufoje ĉe la BARO en Bad Münder, ĉe lingvokurso en Herzberg, ĉe la PSI (Printempa Semajno Internacia) en Mücke, ĉe la Malferma Tago de la CO de UEA en Roterdamo, ĉe la Esperanto-stando de GEJ kaj Ekumena Esp.-Ligo dum la „30. Deut. Evang. Kirchentag" en Hanovro, ĉe la 10-jara jubileo de la Esperanto-grupo Subvisurgo en Rodenkirchen, ĉe la EMAS-kulturtago en Herzberg kaj ĉe prelego de la fama lingvisto kaj akademiano prof-o Daŝgupta el Barato en Göttingen. Heinz dum ĥorvojaĝo al Ĉeĥio povis ĝui la gastamikecon de membroj de la Esperanto-klubo „La Ponto" el Písek. Kaj ni ankaŭ povis aŭskulti raportojn pri vojaĝoj al Majorko kaj Francio kaj vidi fotojn pri la Eklezia Tago en Hanovro kaj vojaĝo al Prago/Písek. Ni vidis filmon de Čeĥov: „En somera vilao", ni aŭskultis kaj kantis diversajn kantojn (ekz.: „Atentu", „Rulu nun", kristnaskaj kantoj) kaj ni ludis kelkajn ludojn („Zug um Zug", „Metro", „Einfach genial"). Ĉiu povis prezenti siajn plej ŝatatajn librojn kaj muzikon (sur kompaktdisko). Ni eksciis pri la inaŭguro de la granda hotelo kaj kongrescentro „Esperanto" en Fulda kaj pri la starto de la reta Esperanto-televido http://internacia.tv . Ni legis artikolojn el la libro „Hunda vivo" kaj el la gazetoj „Revuo Esperanto" kaj „Monato". Ni aŭskultis elsendaĵon de Radio Polonia pri la Esperanto-centro en Herzberg kaj rakonton „Ĉu ekzistas Sankta Nikolao?". Gramatikaj ekzercoj temis pri landoj kaj enloĝantoj, pri la korpo de la homo, pri la direkto„-n", pri „kun, per, pri", pri traduko de „als", ktp. Ni ricevis retpoŝtojn el multaj landoj. Gazetaj artikoloj aperis pri la jarĉef-kun-veno kaj pri la 2-a RR.


Amuza vespero kun Esperanto-amikoj de la klubo „La Ponto" en Písek, Ĉeĥio


Bela vespero post la prelego de profesoro Daŝgupta en Göttingen


Bonan novan jaron deziras La Ratkaptista Bando !


2-a Rata Rendevuo: sur la turo de la Münster-preĝejo


2-a Rata Rendevuo: manĝante kaj la etoson ĝuante en itala restoracio